

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(M.H.) NEDERLANDO
GIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR; 0,70 DOL; 2,15V.FR.

F.MEYER

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

LA KVARFOLIA TRIFOLIO.

Omar fariĝis do riĉega komercisto, kaj Abdalah ĉefgvidisto de karavanoj. Iam okazis, ke la Kalifo petis al Omar alporti por li virinon, kiu alvenos en malproksima havenurbo. Omar ne kuraĝis rifuzi, ĉar la Kalifo estis severa kaj potenca. Kiu kuraĝus malhelpi lin, perdus la kapon. Sed, plenumi la komision, ankaŭ tion Omar ne kuraĝis. Ĉar, el la havenurbo oni devis konduki la virinon per karavano tra la dezerto, kaj en la dezerto estis rabistoj, por kiuj homa vivo malmulte valoris. Kion Omar elpensis? Li iris al Abdalah kaj petis helpon de li. Abdalah ne pensis pri tio, ke la riĉa Omar lin ignoris, kiam li ne bezonis lin. Tuj li estis preta por helpi, kaj kun kelkaj kameloj, kamelgvidistoj kaj dek du kuraĝaj rajdistoj sur ĉevaloj ili iris al la havenurbo. Tie ili venigis la virinon kun ŝia sklavino de la ŝipo, metis ambaŭ en belegan tendon sur riĉe ornamita kamelo, la aliajn kamelojn ili ŝarĝis per ĉiaj komercaĵoj kaj tiam komenciĝis la vojaĝo tra la dezerto.

En la unuaj tagoj ĉio glate iris. La gvidistoj kantis siajn monotonaĵojn, la kameloj faris sian monotonan iradon. La dek du armitaj viroj rajdis antaŭ kaj post la karavano, kaj Abdalah daŭre kontrolis. Sur fiera blankĉevalo li estis jen antaŭ, jen post, jen dekstre, jen maldekstre. Li priatentis ĉion. Kaj la virino en la tendo komprenis, ke ŝi estas sub bona zorgo. El sia tendo ŝi povis vidi ĉion, kaj tiel ŝi rimarkis, ke ĉiuj sentas obeemon kaj admiron por Abdalah, kaj ankaŭ, ke preskaŭ ĉiuj sentas malamon por Omar. Ŝi komprenis la kaŭzojn de tiu amo kaj malamo. Abdalah estis afabla por siaj subuloj, sed Omar estis kruda kaj kruela. Se iu faris malgrandan eraron, li tuj ekbatis. Kaj Abdalah, kiam la viroj kaj

bestoj laciĝis, kaj ne estis tempo por ripozo, li komencis kanti per sia bela, klara voĉo. Ĉiuj kunkantis kaj akiris novajn fortojn. Ne estis miraklo, ke ne nur la viroj, sed ankaŭ la virino en la tendo respektis lin.

Tiu virino povis ĉion observi, sed ŝi mem estis nevidebla. Ne nur la tendotuko ŝin kaŝis, sed krome ŝi portis vualon, longan vualon, kiu nur la frunton kaj la okulojn ne kovris. Tamen la frunto estis kaŝita sub rubando kun harplektoj, tiel ke nur la okuloj estis videblaj. La bela vizaĝo de Leila tamen unufoje montriĝis al Abdalah kaj Omar pro petolaĵo de la sklavino. Nome ŝi ektiris kaj ŝiris la vualon de sia mastrino, ĝuste kiam la du viroj staris apud la malfermita tendo.

Kiom bela Leila estis, tiom malbela estis Kafura, la sklavino. Ŝi estis negrino, sed pli similis simion ol junan virinon. Krome ŝi ornamis sin per multaj objektoj. Ringoj tra la nazo kaj oreloj, vitraj perloŝnuroj ĉirkaŭ la kolo, arĝentaj ringoj ĉirkaŭ la brakoj kaj kruroj, ĉie belaj multkoloraj ŝtonoj, la frunto plena de harplektoj, de kiuj pendis moneroj, kaj sur la verto, meze en la krispa hararo, tufo el papago-plumoj. Efetive, la favoratino de Leila similis pli idol-figuron ol homidon. Kaj krome ŝi ofte faris grimacojn. Malgraŭ tiu malbeleco oni ŝatis ŝin, ĉar ŝi estis gaja kaj gajiga. Kaj sen timo ŝi mokis Omar. Kaj kiu tion kuraĝis, povis esti certa, ke la aliaj havas plezuron en tio. Nur Omar malamis la knabinon. Li opiniis ŝin freneza kaj pro tio li lasis ŝin fari laŭplaĉe.

La karavano atingis la plej danĝeran parton de la vojaĝo. Tiu ĉi regiono estis vera sovaĝejo. Nur sablo kaj nudaj rokoj el ruĝeca ŝtono. La batalo estus malfacila, se venus ĉi tie atakantoj. Abdalah akre rigardis ĉiuflanken. Ankaŭ la sablon li atente observis. Venis la vespero : subite li vidis postsignojn de ĉevalhufoj. Kaj ne estis inter ili postsignoj de la fendita kamelhufo. Tio pruvis, ke trupo el nur ĉeval-rajdantoj trapasis ĉi tie. Kaj certe ili ne venis kun bonaj intencoj. Sendube ili estis rabistoj, kiuj ne celis akiri la malmultajn komercaĵojn, sed Leilan. La sekreto pri ŝia vojaĝo verŝajne estis perfidita.

Abdalah estis prava en siaj konkludoj. Tuj li ordigis la virojn kaj ĵus ili estis pretaj, kiam jam kuglo fajfis tra la aero kaj trafis kameleon. La pafo kaj la falo de la kamelo konfuzigis la karavanon. Kelkaj gvidistoj volis forkuri. maldekstren, kelkaj dekstren. Kaj tiun konfuziĝon la rabistoj, eluzis. Kvazaŭ kreskante el la tero, aperis la sovaĝaj viroj sur rapidaj ĉevaloj de ĉiuj flankoj, la pafilon en la

mano, aŭ la sabron en la pugno. Furioze ili atakis homojn kaj bestojn. Sed Abdalah kaj liaj viroj brave sin defendis. Nur Omar ne helpis. Li staris vekriante.

Sed, ho ve, la brava trupo estis tro malgranda. Dum ili streĉe batalis unuloke, en alia loko kelkaj rabistoj penetris al la tendo; pro fatala pafo la kamelo de Leila falis; unu el la rabistoj kaptis tuj la virinon, metis ŝin sur la ĉevalon kaj forgalopis kun ŝi en la dezerton. Tion Abdalah ne povis permesi. Tuj li turnis sian ĉevalon kaj estis preta por persekuti la rabistojn, kiam oni kriis al li, ke Leila ne estas for. Kaj vere, oni alkondukis la belan virinon el la tendo, sen vualo, kun pala, timema vizaĝo kaj sango--makulita.

„Savu min!” ŝi petegis al Abdalah, „savu min, nur al vi mi havas fidon.”

Abdalah tre miris. „Sed kiun do la rabistoj forkondukis?” li kriis kun granda miro.

„Kafuran,” diris Leila. „Ŝi vestis sin per mia mantelo kaj mia vualo.”

Tiel okazis. Vidante la danĝeron, Kafura tuj komprenis, kion la rabistoj celas. Pro tio ŝi surmetis la vestojn de Leila. Kaj la malbela negrino, la stranga simiaĵo, oferis sin mem por savi la mastrinon.

„Feliĉe,” diris la viroj de la karavano, „ke la rabistoj eraris, nun ni povas daŭrigi la vojaĝon.”

Sed pri tio Abdalah ne volis aŭdi. „Se estus nur sako da kafo ŝtelita de mi,” li diris, „mi irus repreni ĝin. Kaj mi lasus homon en iliaj manoj? Certe ne! Kiu iras kun mi por savi Kafuran?”

Neniu sentis emon. Riski la vivon por negrino, por sklavino! Stultaĵo! Per iom da mono oni ja povas akiri alian. Kaj Omar klopodis konsoli Leilan per la promeso, ke ŝi en la urbo tuj ricevos alian sklavinon.

„Ĉu neniu kuniras?” Abdalah ree demandis. Jes, estis unu. La maljuna onklo, Hafiz, kiu iam helpis fosi la puton.

„Bone, onklo, ni ambaŭ iros!” Kaj ili forrajdis en la malluman dezerton.

Post longa rajdado ili ekvidis la bivak-fajron de la rabistoj. Ili glitis de siaj ĉevaloj, lokis la bestojn ie ĉe la rokoj kaj ŝteliris al la tendejo.

Evidente la rabistoj ankoraŭ ne rimarkis sian eraron. Ĉio estis trankvila. Preskaŭ ĉiuj dormis. Nur tri viroj sidis parolantaj en unu tendo. Ili sidis en lumo de lampo, sur tablo staranta. Ili estis la

tri bando-ĉefoj kaj parolis pri la rabita virino, kiu sin trovis en aparta spaco de la tendo. Abdalah kaj Hafiz povis ĉion vidi kaj aŭdi. La viroj vokis la virinon por enveni. Kafura enpaŝis, levis sian vualon kaj jen ili ekvidis ŝian nigran, malbelan vizaĝon. Unu rabisto ekfuriozis. Li prenis sian pistolon kaj ekpafis al ŝi. Kafura ŝanceliĝis kaj ekkriis pro doloro kaj timo. Sed tuj eksonis dua pafo kaj unu bandito falis teren. Tion Hafiz faris. Subite Abdalah saltis en la tendon kun pistolo en la mano.

„Armu vin!” kriis la du aliaj. Kaj ili ekprenis sian ponardon. Sed pli rapide ol fulmbrilo Kafura piedbatis la tablon, kiu renversiĝis kun la lampo. Kafura ekprenis Abdalahn ĉe la mano, tiris lin al angulo de la tendo, kondukis lin al la malantaŭa parto kaj ŝovis sin tie kun la savanto sub la tendotukon eksteren. Abdalah prenis la infanon — ŝi estis nur dek dujara — en la brakoj kaj fuĝis kun ŝi en la dezerton.

Pro la bruo kompreneble ĉiuj rabistoj vekiĝis. Ili traserĉis la tendon sen rezulto. „Sur la ĉevalojn!” unu ĉefo kriis. „Morta aŭ viva, la perfidulo ne elsaviĝos!”

Sur la ĉevalojn! Pli facile dirite ol farite. La ĉevaloj paŝtiĝis libere en arbareto ekster la tendejo. Subite flamoj leviĝis meze el la arbareto. Timigite la ĉevaloj kuris ĉiuflanken. Kaj jen, ĉe la kvar anguloj de la tendejo estis ankaŭ flamoj; kaj krome la rabistoj aŭdis, ke oni pafas al la gardantoj. Ili pensis, ke multaj malamikoj atakas la tendejon.

„Tie malsupre estas la malamikoj, tien!” kriis unu el la ĉefoj. Kaj la rabistoj tien galopis sur rapide kaptitaj ĉevaloj. Ili rapidis preter Hafiz, kiu kaŝe sidis inter la arbustoj. „Dank’ al Dio, Abdalah estas ekster danĝero,” diris Hafiz en si mem. La flamojn kaj la pafojn, ĉion li faris. Kaj li forkuris ĝuste en kontraŭa direkto de Abdalah, kaj pafis de tie al la gardantoj. Tiel li forlogis la rabistojn de Abdalah.

Feliĉe ankaŭ li forsavis sin de l’ danĝero. Kiam la rabistoj lin pasis, li eliris la kaŝejon, kaptis ĉevalon kaj galopis al la loko, kie li esperis trovi sian nevon kun Kafura.

Dume Abdalah kuris kun la sklavino al la rokoj, kie ili lasis la ĉevalojn. Li surgrimpis sian ĉevalon, metis Kafuran antaŭ si, flustris ion en la orelon de la ĉevalo, kaj jen ili flugis trans la sabla ebenaĵo, dum la ĉevalo de Hafiz ilin sekvis. Post unu horo li kuraĝis malrapidigi la ĉevalon por aŭskulti, ĉu iu sekvas. Feliĉe neniu sono lin

maltrankiviligis. Li pripensis, kien iri por renkonti la onklon je la fiksita loko.

Dum la rapida rajdado Kafura ne movis sin, nek parolis. Kiam la danĝero pasis, ŝi ekflustris la nomon de sia savinto. Abdalah aŭskultis.

„Ĉu ankaŭ vi estis kaptita?” la sklavino demandis.

„Ho ne, dank' al Dio,” estis la respondo.

„Kaj kial vi do venis inter la malamikoj?”

„Kial?” ridetis Abdalah. „Kompreneble por savi vin.”

Tiu respondo surprizis Kafuran. Dum momento ŝi pripensis. „Kaj kial vi venis por savi min?” ŝi demandis serioze.

„Ĉar vi estis konfidita al mi.”

„Ho, vi ĉiam gardu min. Neniu povas ŝirmi min kiel vi.”

„Mi ne estas via mastro,” diris Abdalah, „vi apartenas al Leila.”

Kafura ĝemis kaj silentis. Atinginte la ĝustan lokon, Abdalah prenis la knabinon de la ĉevalo kaj kuŝigis ŝin sur la teron. Kafura eligis dolorkrion, sed tuj diris : „Estas nenio, mia sinjoro, mi estas nur iom vundita.” Kaj en la stela lumo ŝi montris sangantan brakon. Abdalah esploris la vundon kaj bandaĝis ĝin. La sklavino kun miro rigardis.

„Se mi ne apartenas al vi,” ŝi diris, „kial vi tamen prizorgas min?”

„Ĉar Dio tion postulas de mi. Li diras : Estu bona por viaj gepatroj, por viaj parencoj, por georfoj, por la malriĉuloj, por via proksimulo, por la vojaĝanto, kaj ankaŭ por la sklavo, kiun vi posedas.”

„Tio estas bonega,” diris Kafura. „Estas granda Dio, kiu diris tion.”

„Nun silentu kaj iom dormu,” diris Abdalah. „Morgaŭ ni havos longan vojaĝon kaj vi bone ripozu antaŭe.”

Kafura dormis trankvile dum la tuta nokto, sub la zorgo de la brava bedueno. Kiam tagiĝis, Abdalah aŭdis de malproksime trifojan blekadon de ŝakalo. Tuj li respondis per sama hurlado. Baldaŭ haltis spireganta ĉevalo ĉe la loko, kie Abdalah estis. Hafiz desaltis. Feliĉe, ankaŭ li savis sin!

„Nu, mia nevo,” diris Hafiz gaje, „ĉio bone finiĝis. Ili serĉas nin tie, kie ni ne estas troveblaj.”

Abdalah sternis, laŭ kutimo de la mahometanoj, sian preĝotapiŝon sur la teron. Ambaŭ genuiĝis kaj dankis la Ĉiopovan, kiu savis ilin el la danĝero.

„Abdalah,” diris Kafura, genuante antaŭ sia savinto, „vi estas mia Dio, mi adoras vin.”

„Silentu!” diris Abdalah severe. „Tio estas blasfemo. Ekzistas nur unu Dio. Li estas la Eternulo. Li estas la Unika. Nur Lin oni adoru kaj servu.”

„Via Dio estu do ankaŭ mia!” ŝi diris. „Mi ne plus volas havi Dion, kiu permesas mian mortigon.”

„Via Dio,” diris Abdalah, „estas blinda kaj surda kaj muta. Ĝi estas nur peco da ligno, kiu putras tie malproksime en via lando.”

„Ne,” interrompis lin la knabino, „mia Dio ne estis tie, li estis ĉe mi : sed li perfidis min. Jen,” kaj ŝi tiris plumotufon el siaj haroj, „jen li estas, rompu lin, mi malbenas lin.”

„Ĉu tio estas via Dio?” ridetis Hafiz, „tiuj papago-plumoj?”

„Jes,” diris Kafura, „mia patrino donis tion al mi, kiam mi estis vendita. Bela dio, ĉu ne?”

Dum ŝi disŝiris la plumojn, elfalis arĝenta folieto.

„Jen,” ŝi diris al Abdalah, „ion alian mi ne havas por doni al vi.”

Abdalah kortuŝiĝis. Ĝi estis la arĝenta trifolia folieto. Li akceptis ĝin per tremanta mano, kaj diris : „Ho, mia onklo, vidu, kion Kafura alportas por ni el sia negrolando!”

„Dio sendas ĝin al vi!” respekteme diris Hafiz.

Kaj la du amikoj ĉirkaŭbrakis la malbelan negro-infanon, kiu neniom komprenis pri tiu koreco, sed estis tre dankema pro la montrita amo. Tiu amo al Dio kaj la homoj alportis por Abdalah la arĝentan folieton.

(Daŭrigata.)

ESPERANTO-FILMO.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi vidis la propagandfilmon faritan de S.ro Schut pri la kunveno de la Tutmonda Junular-Organizo en Groet en aŭgusto de tiu ĉi jaro. La filmo montras la pejzaĝon en la ĉirkaŭaĵo de Groet kaj Schoorl, kies belecon la filmisto bone sukcesis reprodukti. En la salono, en kiu mi vidis la filmon, estis krom multaj plenaĝuloj ankaŭ kelkdeko da infanoj, kiuj partoprenis en la Junularkunveno en Groet. Kompreneble ili kun granda plezuro vidis la belajn memoraĵojn pri tiu agrabla tempo; multfoje ili laŭte esprimis siajn ĝojon kaj surprizon.

La bildoj montras la malfermon de la kunveno per hisado de la esperanta standardo kaj baldaŭ aperas la virino, kies iniciativo

havigis al ni ĉi tiun belan propagandfilmon : S.ino E. v. Veenendaal-Bouwes. Laŭtaj ĝojkrioj de la infanoj atestas pri la rilatoj inter la partoprenintoj kaj la gvidantino de la Junularkunveno. Intertempe aperas longa vico da infanoj antaŭ la manĝejo en Groet, flanke staras grandega stelo et floroj. La flagoj en la grupo montras, ke multaj landoj estas reprezentataj ĉi tie. La filmisto ne forgesis „preni” la gvidantojn de la infankluboj el la diversaj landoj. Tuj la infanaro en la salono komencas saluti la konatulojn sur la filmo; bonan tagon, s.ro Morcombe, ktp. Kaj ili krias gaje al amikoj kiam la filmo montras ĉiujn sur la Groeta vojo dum promenado. Estas tre gajaj momentoj.

La filmisto ne forgesis la internon de la manĝejo kaj la kuirejon, kie diligentuloj preparas ĉion. Ankaŭ la desegnistoj de „La Juna Vivo”, Jekke van Dijk kaj Floor Meijdam (la nuna sekretario de T. J. O.) aperas antaŭ niaj okuloj, kun la propagandiloj. En la granda salono dormis pli ol cent knabinoj, kun siaj gvidantinoj, kaj vespere tie sonis ŝercvortoj en multaj lingvoj (ankaŭ en esperanto). La dormado sur la pajlosakoj estis aparta aventuro.

La sekvantaj bildoj montras la infanaron dum ekskurso al la fromaĝovendejo en Alkmaar. Estis varme tie kaj la partoprenantoj manĝis (aŭ frandis) glaciaĵon. Tio havis la aprobon de ĉiuj en la salono.

En Bergen la junuloj kantis. Unu el ili agis kvazaŭ direktoro de ĥoro. Belaj bildoj sekvis pri promenado al Schoorl kaj pri lakto-trinkado. La lasta havis la plenan konsenton de la juna publiko.

La filmo montris belajn bildojn de Volendam kaj finiĝis en Enkhuizen, almenaŭ la unua parto.

Baldaŭ sekvis la dua kaj montris la marbordon apud la Norda Maro. La junuloj ludis sur la sablo kaj en la akvo.

Ankaŭ estis „artistoj” inter la partoprenintoj. Tre belaj dancoj de grupoj el Kimrujo kaj Francio kaj ankaŭ soldancoj aperas sur la ekrano. Malantaŭ la „artistoj” trankvile staris bovidoj. La filmisto filmis ankaŭ la „publikon” en Groet kaj kantantan fraŭlinon.

Partoj de teatraĵoj sekvis kaj en la salono multaj „aktoroj” el Groet vidis sin mem sur la filmo. La prezentado tre plaĉis al la publiko en la salono, sed S.ro Schut prave rimarkis, ke multaj infanoj vidis konatulojn kaj amiketojn, sekve ilia aplaŭdo estis iom partieca. Li tial demandis al la plenaĝuloj, kiuj ne estis en Groet, kaj nun vidis la filmon, kia estas ilia opinio. Ankaŭ ĉi tiuj homoj

kun plezuro vidis la filmon. La prezentado daŭris proksimume 45 minutojn kaj dum la tuta tempo ĝi kaptis mian atenton. Ĉe la fino mi faris severan provon pri la filmo : Mi demandis al mi mem, ĉu mi deziris vidi ĝin denove? Kaj senrezerve mia respondo estis : Jes! La filmo ne nur estas propagandilo, ĝi interesas ankaŭ esperantistojn. Ĝi estas farita de amatoro, sed de lerta kaj sperta amatoro. Vidu ekzemple, kiel li sugestas al ni muzikon! La filmo estas silenta filmo. Venas knabino, kiu dancos laŭ muziko kaj nun la filmo montras funkciantan gramofonon. Kompreneble ni aŭdas nenion, sed la sugesto pri muziko restas dum la danco. Simpla afero, se oni nur scias ĝin!

Sendube tiu ĉi filmo trovos sian vojon en la mondo.

P. KRIJT, Nov. 1938.

INSEKTOJ KONTRAŬ HOMOJ.

Militoj kaj akcidentoj kruele persekutis la homaron. La lasta milito pereigis 20 milionojn da homoj. Vulkan-erupcioj en okcidenta Hindujo kaj sur la insuloj de Granda Oceano, tifonoj kaj tertremoj mortigas ĉirkaŭ 60.000 homojn dum unu jaro. Tio estas granda nombro. Sed dum la lasta scienca kongreso pri insektoj la scienculoj deklaris, ke la insektoj konstante ekstermas pli da homoj ol militoj kaj ĉiuj akcidentoj kune.

La malario-kulo. Dum jardekoj oni kredis, ke la fi-fama malario estas iu marĉfebro, kiu estiĝas sekve de haladzado el marĉo. Ĝis oni eltrovis, ke kulo ĝin kaŭzas. En kia maso tiu kulo aperas, oni nur povas kompreni, se oni scias, ke siatempe la laboroj ĉe la Panamo-kanalo prokrastiĝis pro ĝi. Dum tuta jaro ĉesis ĉia laboro, post kiam dum 11 monatoj mortis pli ol 50.000 homoj. Oni sukcesplene komencis la batalon kontraŭ la malaria kulo; tamen mortis en la jaro 1937 sur la balkana duoninsulo kaj en orienta Azio kaŭze de tiu malsano pli ol 55.000 homoj... Se oni alkalkulas ĉiujn aliajn regionojn, ekzemple la dense loĝatajn riz-regionojn en hinda- kaj franca Hindujo, Mez- kaj Sudameriko kaj la vastajn marĉ-regionojn en Siberio, jen oni ricevas la teruran nombron de preskaŭ 2 milionoj da malario-mortintoj dum unu jaro. — Malgranda pik-kulo estas la murdisto...

Insektoj kaŭzas dormo-malsanon. En la vastaj koloni-teritorioj de Mezafriko la malbonfama Tsetse-kulo terure minacas la homojn. Kiun ĝi pikas, tiu fariĝas dormmalsana. Verdire malbona esprimo,

ĉar la malsanulo estas daŭre laca kaj perdas ĉiun malsaton. Li verdire malrapide dormante formortas. Malgraŭ ĉiuj klopodoj de la blankaj koloniistoj la Tsetse-kulo ĉiujare postulas ĉirkaŭ 100.000 viktimojn.

Ekzistas en la Kongo-lando vastaj regionoj, kiuj estas tute senhomaj pro la malgranda Tsetse-kulo.

En antaŭaj jaroj estis la puloj ne malpli danĝeraj ol tiuj ĉi insektoj, ĉar la puloj estas bonegaj pest-infektantoj. En la grandaj pestregionoj de Hindujo la puloj estas same malutilaj al la homaro kiel la malario- kaj Tsetse-kulo aliloke. Malfeliĉega hazardo estas, ke ĝuste la pest-regionoj de la tero estas tro riĉaj je puloj!

Por komencantoj.

LA SAGA JANSEN.

S.ro Jansen estas senlabora muzikisto, li eĉ devis vendi sian violonon. Iun tagon li venis hejmen kun ĝoja mieno kaj diris al sia edzino : „Mi povos hodiaŭvespere ludi violonon ĉe edziniĝa festo, kaj per tio gajni kelkajn guldenojn.”

„Ho, tiujn guldenojn mi tre bezonas,” diris la edzino. „Sed, vi ja ne plu...”

„Ho jes, mi jam pensis pri tio, sed nia supra najbaro ankaŭ havas violonon, mi klopodu lui ĝin.”

Jansen tuj decidis fari tion. Li surgrimpis la krutajn, mallarĝajn ŝtupojn, kiuj direktis al la loĝejo de la najbaro. Fine li frapis la pordon.

„Ha, feliĉe ke vi estas hejme,” diris Jansen, vidante ke estas la najbaro mem. Li nun ĉion rakontis, pri la festo, pri la eksterordinare multa mono, kaj ke li bedaŭrinde ne plu posedas violonon. Jes, fine li demandis, ĉu li povos lui por unu vespero la violonon de la najbaro.

La najbaro tute ne ŝatis fari tion, sed post tiom da plendoj li promesis lui ĝin. Sed kondiĉe, ke Jansen estu singarda kun la instrumento, ĉar ĝi estas altvalora, kaj lia plej bona amiko!

Tio Jansen ja certe estos! Kaj varme dankinte li foriris.

Vespere Jansen ludadis — kaj estis tie gaje, gajege eĉ. Oni kantis, trinkadis kaj dancis. Sed subite ankaŭ la seĝoj, glasoj, tabloj ekhavis plezuron en danco, ĉar ili nun flugadis tra la ĉambro.

Kio estas? Kia kverelo! Jansen rigardis tiun strangan scenon,

kaj li sentis, ke li devas helpi ree pacigi la homojn. Li ne plus povis reteni sin, kaj kiam kverelanto lin pasis, li karesegis lian kapon — per la violono. Ho diable, la violono de la najbaro! Li ankoraŭ havas ĝin en la manoj, sed — en du pecoj!

Malkontenta pri sia helpo, kaj kun la du pecoj sub brako, Jansen marŝis hejmen.

„Ho ĉielo,” kriis la edzino, „kio okazis?”

Per malmultaj vortoj Jansen rakontis ĉion kaj ili kune pensadis, kion fari. Subite Jansen ekkriis: „Mi jam scias! Mi vidas lumon!” Kaj li ekdancis pro ĝojo. „Mi havas bonan ideon! Vi prenu la violonon kaj iru supren al la najbaro. Kiam vi estas ĉe la pordo vi forte frapu, kaj post tio vi faligu vin de la ŝtuparo, kun la violono kompreneble! La najbaro kompatos vin, kaj pardonos ĉion! Nu, ĉu ne bona ideo?”

„Ho jes, tio estas eĉ bonega ideo!” konfesis la edzino. Ŝi tuj prenis la violonon kaj grimpis supren. Kiam ŝi atingis la pordon ŝi frapis fortege, post tio faligis ŝin kun la violono, kriis laŭte... rompintis du fingrojn, perdis kelkajn dentojn, disŝiris siajn vestojn, kaj... **neniu estis hejme!**

(El iu festvespero.)

Rerakontis bulgara
S.ino Jahn-Atanasova.

Respondu al jenaj demandoj :

Ĉu S.ro Jansen estis riĉa? Kial li prunteprenis violonon? Kie li devis ludi? Ĉu la festo estis gaja? Kiel rompiĝis la violono? Ĉu Jansen bone gardis la violonon? Kia li poste estis? Ĉu la edzino sciis konsilon? Kion Jansen elpensis? Ĉu okazis laŭ lia deziro? Kio okazis al la edzino? Ĉu la najbaroj estis hejme?



La partoprenintoj en la Groetkunveno certe rememoras la pitoreskan ponteton en Volendam (Ned.).

Atentu la sciigon je paĝo 88, rilate kotizpagon.

ENIGMOJ

Metu vortojn sur la malplenajn lokojn, kiujn vi trovas en la historio. La vortoj havas tiom da literoj, kiom da punktoj vi vidas.


La unuaj literoj de tiuj vortoj kune formas la nomon de konata persono.

Se vi ŝatas, mi rakontos al vi aventuron, kiun mi havis antaŭ kelkaj monatoj en Jugoslavujo, diris la vojaĝanto, kiu ĵus revenis ĉe sia familio. Ĉiuj atente aŭskultis, kaj li komencis :

„Post longa marŝo en la montaro mi estis tre kaj mi sidiĝis sud granda arbo por ripozi. Mi forlasis la jam frue en la mateno kaj sidinte kelkan tempon, mi kuŝiĝis, mi volis duonhoron kaj poste foriri por atingi loĝejon antaŭ la nokto. Mi fermis la kaj baldaŭ ne sciis kie mi estas. La estis tre bela, la suno estis varmiga, sed blovis venteto kaj mi kuŝis en la ombro de la foliaro. Ĉar mi estis proksimume tridek kilometrojn miaj tre bezonis longdaŭran ripozon kaj tial mi dormis multe pli longe ol mi intencis.

Kiam mi fine vekigis, la suno jam preskaŭ subiris. Mi manĝis iom da pano kaj la lastan, kiun mi havis kaj foriris. Komence mi ankoraŭ bone povis vidi la vojon, sed post unu horo pli kaj pli mallumiĝis. Mi kiom eble plej, ke mi ne perdu la vojon, sed mi estis en la kaj sub la arboj oni vidas ankoraŭ malpli ol sub la nuda ĉielo.

Kiom mi bedaŭris, ke mi ne kunprenis lanternon. Nun al mi tio, kio estas plej necesa .. malluma, Tamen mi malrapide iris pluen. Sed fine mi ne kuraĝis daŭrigi mian vojon. Mi devis resti tie en la mallumo ĝis la luno aŭ la suno reaperos. Mi sidiĝis kaj atendis. Sed kiom longe! La minutoj ŝajnis kaj mi ne povis dormi post la longdaŭra dormo kiam la suno ankoraŭ brilis. Miaj aŭdis multan brueton en la arbaro kaj kelkfoje mi pensis, ke sovaĝa besto estas proksima. Mia kuraĝo ne plu estis granda, mi devas konfesi tion. Tiam mi nepre aŭdis, ke iu besto alproksimiĝas. Certe ĝi ke homo, bongusta homo aŭ bongusta homa sango estas havebla kaj ĝi proksimiĝas pli kaj pli. Kiuj sovaĝaj bestoj ankoraŭ troviĝas en ĉi tiuj arbaroj? Ĉu lupoj? Mi ankaŭ pensis pri urso, sed la bruo ne estas sufiĉe laŭta por kredi, ke urso estas proksimiĝanta. Singarde mi rigardas ĉien kaj ho! tie mi vidas du ardajn verdajn okulojn, rigardantaj al mi. Mi tremegis kaj sendube senkonsciiĝis. Kiam mi rekonsciiĝis, mi



komunikoj

Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : S.ro M. v. d. Horst, Johan Idastraat 32, Rotterdam (Ned.), ĝironumero 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Instruisto, Koedijk; ĝironumero 310334.

„La Peranto inter la Perantoj” : En la estrarkunveno en Schoorl ni decidis eldoni „La peranto inter la perantoj”. Ĉifoje ni farigis 400 ekzemplerojn, kiuj jam elĉerpiĝis.

Filmservo : La kopio de la filmo, kiun ni sendis al Anglujo estas same bela, kiel la originalo. La grupoj en Anglujo, kiuj deziras uzi ĉi tiun belegan, modernan propagandilon turnu sin al : S.ro J. Holland, 61 Vandyke Road, Leighton-Buzzard, Anglujo.

Glumarko : La T.J.O.-glumarko aperis. Ĝi vere estas belega. Ni jam forsendis kelkmilojn, tamen — restas multegaj! Ĉiu T.J.O.-ano mendu almenaŭ 100 ekzemplerojn. Kaj oni ankaŭ provu vendi ilin al ne-esperantistoj, ĉar la marko estas belega propagandilo! Prezo : 100 ekz. por 20 cendoj. Oni mendu la glumarkojn al la sekr. de T.J.O. en Leerdam (Ned.).

Insigno : Ni tre deziras eldoni ankaŭ insignon, kun la sama simbolo, de la glumarko. Sed — ankoraŭ mankas mono. Ĉiu vendu kiom eble plej multe da glumarkoj, por ke ni ricevu monon por farigi ankaŭ la belegan insignon!

Grava sciigo por la nederlandanoj : Juna amiko donacis belegan vazon el la famkonata kristalfabriko en Leerdam. Sur la vazo estas la bela desegno de la glumarko kun la vortoj „Tutmonda Junular-Organizo”. Ĝi estu instigo por varbi simpatiulojn al T.J.O. Kompreneble tiu, kiu sendas la plej multajn simpatiantojn, ricevos la belan donacon. Inter la ne-esperantistoj estas multaj, kiuj pretas subteni la novan organizon, do ne estas malfacila tasko! La konkurso daŭros ĝis la 15-a de januaro 1939.

Poŝtkartoj : La red. de „L. J. V.” donacis al T. J. O. 1500 kartojn de Jekke van Dijk. Ĉi kartoj estas tre taŭgaj por forsendi dum la decembra monato. Prezo : 10 ekz. por 25 cendoj (2 resp. kup.). La kartoj estas mendeblaj al „La Juna Vivo”, W. Grafdijk (N.H.), Ned.

Donacoj : La esp. grupo en Hilversum donacis 1,50 guld. Fino v. Th. en Y., 2,50 guld.

Membrokarton : Al bonaj amikoj de „La Juna Vivo” ni sendis **membrokarton**, pour varbi unu simpatiulon. Kiu ne sukcesis, bonvolu resendi la nevenditan karton.

ORNAMU VIAN SKRIBPAPERON PER LA BELA GLUMARKO DE T. J. O.



Malgrandaj knaboj
el Volendam.

DU BETULOJ.

- | | |
|---|--|
| <p>1. Ĉe fenestro mia
Du betuloj ploras,
Pri somer' pasinta
Ili rememoras.</p> | <p>2. Branĉojn senfoliajn
Teren klinas vento,
Tremas blankulinoj
Pro dolora sento.</p> |
| <p>3. Longe dum la nokto
Ŝajnas al infanoj,
Kvazaŭ iu frapas
Per ostecaj manoj.</p> | <p>4. « Kvietiĝu. Dormu,
Etaj petoluloj,
Ĉe fenestro nia
Ploras du betuloj.»</p> |

Riga (Latvujo).

Ludmila JEVSEJEVA.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Danujo : S.ro S. Aa. Jensen, Skriveren, Gandrup, petas respondon de S.ro Keniti Hasegawa, Hokkaido (Japanujo), S.ro Efim Stoebelev, Moskvo (U. S. S. R), S.ro Rasmussen, Mosfellsveit (Islando), S.ro Angiolo Carlesi, Pisa (Italujo) kaj de Emeriko Brand, Abaŭjszànto (Hungarujo).

Latvujo : S.ro Voldemar Rozentals, Andreju osta i-2, Riga, dez. interŝ. il. poŝtk., bildlibretojn de ĉefurboj. Aŭfranku leterojn per malmultekostaj diversaj poŝtmarkoj. Respondo certa. Anonco ĉiam validas.

Nederlando : S.ro G. Selhorst, Burgem. Peeklaan 252, Schoorl, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

Nederlando : F.ino E. E. L. M. M. Schünemann, farmacentino, Blijhamsterstraat 51, Winschoten, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Nederlando : Junulo deziras viglan korespondadon kun f.ino pri interesaj temoj. Sendu foton. H. Wittenberg Jzn. „Ekeris” 381, Woudenberg (U.).

Nederlando : Esp. grupo (8 pers.) en Groet (N.H.), dez. kor. kun eksterl. grupo. Adr. : S.ro W. Bant, lernejestro, Groet (N. H.).

Usono : Altlerneja Esp.-klubo (13-19 jaraj geanoj) dez. kor. per leteroj kaj il. poŝtk. S.ro George Falgier, gvidanto, Winchester, Illinois.

Anglujo : 12-13 jaraj knabinoj deziras korespondi kun gejunuloj en la tuta mondo. Tinker's Farm Lernejo, Northfield, Birmingham.

Nederlando : S.ino T. Tensen-Zijp, Vilaĝstrato 65, Abbekerk (N. H.), dez. kor. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, poŝtmarkojn kaj leterojn. Resp. certa.

Estonio : Alf. Maldor, Koorkülaveski, Torva, dez. kor. rek. poŝtk., leteroj, interŝ. poŝtmarkojn de la tuta mondo. Respondos ĉiam.

Nederlando : La esperanto-grupo el Julianadorp serĉas gekorespondantojn en ĉiuj landoj. Certa resp. F.ino T. Bakker, Julianadorp (N. H.).

Nederlando : 10 geknaboj, 13-14 jaraj deziras korespondi. Skribu al S.ino J. de Ruyter-van Herwerden, Oudkarspel A 147.

Nederlando : Instruisto en popollernejo deziras interŝanĝi interesajn bild-poŝtkartojn. J. M. Toorneman, Diepenv. Weg 169, Deventer.

Estonio : Divers-aĝaj kap profesiaj geanoj dez. kor. kaj interŝ. il. poŝtk. fotojn, esp-ajojn. turism. prospekt. kun ĉiuj landoj. Resp. garant. S.ro Simson, Rua 76, Pärnu.

Svedujo : Komencanto dez. koresp. kaj interŝ. pm. kaj poŝtkartojn ilustritajn. Resp. certa. S.ro G. Ström, Holländarelp. 7, Götenborg.

Svedujo : S.ro Arvid Anderson, Eksäter, Saltsjö-Duvnas, deziras korespondi per leteroj kun ĉiuj landoj. Respondo garantiita.

Nederlando : D. Blonk, 16-jara kartonaĵisto, Baanstr. 3, Gouda, dez. kor. kun gek.doj, volonte el Usono, pri ĉiuj temoj.

Latvujo : Gvido Rasmans, gimnaziano, Riga, Marijas i 56/58-16, dez. korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Nederlando : K.do J. S. Loof, Tholenstr. 11, Terneuzen, dez. kor. k. interŝ. pm. kun ĉ. l., precipe kun Jugoslavujo, Bulgarujo, Ĉeĥosl., Rumanujo. Resp. certa.

Francujo : Ponchart Josefo, 50 rue Fénélon, Liévin (P. de C.), dez. kor.

Francujo : Gérémió Livio, 42bis rue V. Hugo, Avion (P. de C.), dez. kor.

Francujo : Koran Antoine, 17em rue n° 20, Méricourt (P. de C.), dez. kor.

Francujo : Gouillou Gabriel, N° cité des 50, Bilby-Montigny (P. de C.), dez. kor.

Maroko : S.ino Fink, 5 S. de Brazza, Casablanca, interŝ. pm. kun ĉiuj landoj. Sendu 100 pm. kaj pli multe, ĉiam respondas.

ANONCETOJ.

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO. Libretoj 32-26 paĝoj, po 0,35 guld. Serio 10 volumetoj 2,50 guld. La enhavo interesa, instrua, bonstila, speciale taŭga por daŭriga kurso. Kursgvidantoj rajtas peti specimenon. Mendebila al „La Juna Vivo”.

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto A. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Weesperzijde 3, p/a. Nieveld, Amsterdam.

INTERNACIA LERNOLIBRETO „LA JUNA VIVO”, la plej taŭga kaj mal-kara por komenckursoj. Tre favoraj recenzoj. Kursgvindantoj petu specimenon! Prezo 20 cendoj. Ĉe mendo de almenaŭ 20 ekz. la prezo estas po 16 cendoj plus afranko.

RAKONTOJ PRI NEDERLANDO, de D.ro G. Duhamel, tradukita de Roland Dupuis. Eleganta aspekto; sprita enhavo. Prezo : 0,60 c. plus 10 c. por afranko. Mendebila al : „La Juna Vivo”, West-Graafthijk.

INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”, belaspekta libreto; praktika formato ;enhavas 34 kantojn kun muziko. Prezo 0,35 guld. 2 ekz. por 0,50 gld.

KALENDARO POR 1939. Okaze de Kristnasko aŭ Novjaro sendu viajn bondezirojn per Kalendara Poŝtkarto por 1939. Klarlegebla, dukolore presita sur bona kartono, ĝi estas ŝatata donaco, kiun la ricebinto volonte uzas tutan jaron. Prezo afrankite : 20 ekz. por hgld. 0,44; 100 ekz. por hgld. 1,76. Specimene 5 ekz. por hgld. 0,12^{1/2} aŭ 1 resp. kup. Du modeloj haveblaj : No 1101, presita laŭlonge, No 1102 presita laŭlarĝe. Eldonejo : HEO, Abcoude, Nederlando. Poŝtkonto 88015.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO, oficiala organo de T.A.G.E. (Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj). Petu senpagan specimenon de la adm. P. Korte, Veendam, Nederlando.

ATENTU la daton, sur la koverto de ĉi tiu numero. Je tiu dato finiĝas via abono je „La Juna Vivo”. Afable ni petas vin, pagi vian kotizon por la nova jaro antaŭ **15 januaro**. Nia ĝironumero : 209354.

La eksterlandaj abonantoj sendu la monon al :

BELGUJO : H. Rainson, Hombeeksche stw., 54, Mechelen. Ĝironumero 335183.

BRITUJO : Brita Esp. Asocio, 142 High Holborn, London W. C. I.

ĈEĤOSLOVAKUJO : Esperanto-Asocio, Truhlaska 16, Praha II. Poŝtĉek-konto 12.371.

DANUJO : Dana Esp. Instituto (abonejo), Musikhuset, Nyköbing, F.

ESTONIO : Esperanto Asocio de Estonio, Tallin. Poŝtkast 6.

FRANCUJO : F.ino J. Lepachelet, 13 Place Victor Hugo, Somain (Nord). Ĝironumero : Lille 72.36.

HUNGARUJO : Hung. Skolta Rondo, Nagy Sandor U-6, Budapest V.

JUGOSLAVUJO : P. Golobiĉ, Instruisto, Jesenice-Fuzine.

LATVUJO : F.ino Ludm. Jevsejeva, Riga, Reformatoru 14/5.

MAROKO : S.ino Fink, 5 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca.

NOVEGUJO : Norv. Esp. Ligo, Skappelsgate 5, Hamar.

POLUJO : Prof. Sygnarski, Kordeckiego 23, Budgoszcz.

SVEDUJO : Sveda Lab. Esp. Asocio, Stokholm.

SVEDUJO : Sveda Eladona Societo Esp., Box 698, Stokholm I.

SVISUJO : S.ro R. A. Dasen, St. Jean 17, Geneve.

USONO : Amerika Esp. Instituto, 1111 Brooke Road, Illinois.